

# Astura Esperanta Asocio

## NIA DUMJARA LABORADO

Jen la 84a numero de nia revuo. Ĉi foje ni atingis rekordon en kio rilatas al la nombro da paĝoj. 100 paĝojn! Ja, tio estas ia maniero festi kaj reliefigi tion ke nia **Astura Esperanta Asocio** ĵus fariĝis Centjara.

Tion ni devas soleni iamaniere. Do, ĉi tiu numero de **HELECO** estas speciale dediĉita al la jarcenta historio de la Esperanta movado en nia urbo, kaj tio, ja, ne povas esti farita en la kutima nombro da paĝoj de la revuo.

Por la kompilado de tiu historio estis necese movi grandan amason da paperaĵoj, traserĉi dokumentaron, kolekti fotografaĵojn, tralegi artikolojn kaj dosierojn… Ĉio-ĉi, ja, devas esti enkalkulata en la dumjara laborado pri kiu raportas ĉi artikolo.



A.E.A.-informilo

Numero 5 Aprilo 2009

PorEsperanta propagando

FOTO-RAPORTO DE LA RENKONTIĜO

Oni devis prepari ankaŭ dokumentaron por provizi ĝin al la informmedioj kiuj konsentus publikigi ion pri Esperanto, nia E-asocio kaj ties Centjaro. Tiurilate oni atingis ion: La Princlanda Radio-stacio elsendis, en monato julio, intervjuon faritan al la Prezidanto kaj la Sekretario de **Astura Esperanta Asocio**. Kaj la tagĵurnalo ***La Nueva España*** de Gijón publikigis, en monato aŭgusto, raporton pri nia Esperanta asocio kaj ties historio. Ni esperu ke tiu publika apero de esperantista asocio utilu por la altiro de gelernantoj por la venonjaraj kursoj.

La ellaborado de la revuo ne apartigis nin de la plenumo de la informado specife adresita al la membraro de la E-grupo, t.e. ***AEA-Informilo***. La 5a numero de tiu informilo estis eldonita en aprilo de la nuna jaro. Per ĝi, krom alia informo kiu jam estis priraportita en la antaŭa numero de **HELECO**, oni informis ankaŭ pri aliaj aferoj okazintaj post la eldono de la 83a numero de la revuo. Tia estis la kazo de la esperantista festo aŭ Zamenhofa Tago de la jaro 2008, okazinta la 14an de decembro, en tre malfavoraj veteraj kondiĉoj. La partoprenantoj ne estis multaj kompare al antaŭaj jaroj pro tio ke la vetero estis tre akra. Ne eblis stari ekstere en la strato Esperanto. La ĉeestantaro devis atendi en kafodrinkejo la horon por la bankedo. La bankedo okazis en Restoracio **Parrilla Muñó**. En ĝi regis, la kutime bona kaj afabla etoso de tiutipaj renkontiĝoj.

Alia afero pri kiu raportis la ***AEA-Informilo*** estis la forpaso de samideano Juan Manzano Bartolomé, kiu estis okazinta la 10an de novembro de 2008. Kun li malaperis la lasta el la iamaj membroj de **La Verda Kolombejo** kiuj translokiĝis al nia urbo kaj al nia E-grupo antaŭ proksimume 30 jarojn.

Se la ellaborado de ĉi revuo ne malebligis la publikigon de la informilo, ne okazis same en kio rilatas al la Interreta paĝo de la Asocio. Dum la lasta jaro nur tre malmulte da materialo estis enkondukita en la mondan reton. Kaj tio estas sufiĉe malbona afero ĉar la ret-paĝo estas nia plej potenca ilo de surekstera projekciado. Pli grava ol la internaj informiloj kaj la raportoj pri la esperantistaj festoj de la E-grupoj estas la E-kursoj kaj Esperantaj materialoj destinataj al la ĝenerala publiko, ĉar ĉiu esperantista rondo ne ekzistas por si mem, sed por propagandi favore al la internacia lingvo kaj diskonigi ĝin.

Rilate al la interreta paĝo oni devas reliefigi ke la farenda laboro estas enorma. La efiko de la per-